EKO 2022

Esperiga Komuniko

Subtene al la regiona, landa kaj loka agado

UEA

ilei

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, Elda Doerfler

**ENHAVO n-ro 52> ● 400! ● Indonezio ● UEA multlingve ● Greziljono < sept. 22**

La EKO-komunikoj atingis brilan mejloŝtonon, kiu klare montras la konstantecon de la komunika servo de UEA. Depost la lanĉo en 2013, ĝuste nun ni pretigis nian kvarcentan komunikon!






# Nova junulara sekcio en Indonezio

https://www.youtube.com/watch?v=PBtUKHQmh_4

Ne eblas savi ĝin, do rigardu mem. La vidbendo temas ĉefe pri gratuloj de TEJO-aktivuloj el la tuta mondo.

# Subteno al Afriko per libroj

Ni ŝatus danki ĉiujn, kiuj partoprenis en ĉi tiu kolekto de lernejaj provizoj por orfoj kaj forlasitaj infanoj en nia COPROFER-centro. Kvankam la celo de la kolekto ne estis 100% atingita, almenaŭ ni havis 50% el la esperataj donacoj. Ni kolektis 4 skatolojn da kajeroj, 96 matematikajn skatolojn kaj 3 skatolojn da plumoj.

Ni disdonis ĉi tiujn ilarojn al niaj infanoj;  ili komencis la lernejan jaron kaj ili partoprenas lecionojn kiel aliaj infanoj. Ni dankas vin kaj ni diras dankon multe al ĉiuj partoprenantojl.Se ankaŭ vi volas subteni nian asocion, ne hezitu sekvi niajn agojn kaj kontakti nin:

coprofer.asbl@gmail.com
+243 71357598



# Kursoj en Brazilo kaj Japanio

De: **edukado.net** <redaktanto@edukado.net>

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo:  Curso Básico de Esperanto/Baza Kurso de Esperanto
Gvidantonomo:  Miguel Rocha Bento
Tipo:  Nova movada kurso
Loko:  Porto Alegre, Brazilo
Aldoninto:  Miĥaelo

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27445

Nomo:  Kurso por ekzameniĝontoj en Sapporo
Gvidantonomo:  Nitta Takamichi
Tipo:  Nova movada kurso
Loko: Sapporo (ĉefurbo de la norda insulo Hokajdo), Japanio
Aldoninto:  superteksto

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27444

# Inda dulingva retpaĝaro de JEI

JEI estas la Landa Asocio de UEA en Japanio, kun propraj oficejo kaj stabo. Ĝi mesaĝas pri retpaĝo, kiu ĉiuokaze meritas viziton.


“Mi ekfaris retpaĝon de la Japana Esperanto-Instituto (JEI) per la japana kaj Esperanta teksto.”

https://www.jei.or.jp/deklarode2022uk

Hirojuki JOKOJAMA

# UEA donas bazajn informojn en ok lingvoj

Ne ĉiu scias, ke la malnova retejo de UEA proponas bazajn informojn en ok lingvoj pri Esperanto kaj ĉefe pri UEA mem. Nia bildo montras la enirejon en la hispana. Eblas elekti plie la anglan, francan, germanan, portugalan, nederlandan, rusan kaj ukrainan. Aliru ilin per: https://uea.org/info




# Festo-listo

Naskiĝis la paĝo Festindaj Tagoj https://uea.org/vikio/Festindaj_tagoj.

# Eŭropa Tago de Lingvoj

Por instruistoj kaj sekcioj en la landoj de EU kaj aliaj landoj, kie la eŭropa tago de lingvoj estas festata.

La 26-an de septembro oni festas plurloke la eŭropan tagon de lingvoj. Ankaŭ en multaj lernejoj. Por tiu okazo la Eŭropa Komisiono de UEA kunlabore kun Eŭropa Esperanto-Unio ellaboris tekston, kiun vi trovos en kelkaj lingvoj en https://uea.org/vikio/E%C5%ADropa_tago_de_lingvoj_2022 .

Ni ĉiuj devas fari ion, ekzemple mi estas preparanta programeton por la ret- radio EsperRadio, kiu estos spektebla la 26-an de septembro kaj la filmeto povos esti uzata ankaŭ en klasoj por la eŭropa tago de lingvoj kaj por havi okazon paroli ankaŭ pri Esperanto.

prof. laura brazzabeni, +39 3286461063 (ankaŭ whatsapp)
direttore generale IIE : http: istituto.esperanto.it

# JoeMO anoncas novan kanton

Mia nova kanto *VIRO KAJ VIRINO* estas disponebla en jutubo. Ĝuu ĝin kaj bonvolu diskonigi ĝin al kiel eble plej multaj el viaj konatoj.

https://youtu.be/3WlxLplrqMc

Amike Joe Mo (Joel Muhire).

# Greziljono oktobre

La franca Kulturdomo Greziljono invitas vin dum la ferioj (francaj)

- 2022-okt-14/16 ➪ Staĝo de **DANCOJ** bulgaraj, rumanaj, hungaraj
- 2022-okt-17/nov-03 ➪ Volontulaj laboroj por purigi kaj ripari la **basenon**

- 2022-okt-17/24 → BEMI-Semajno de E-lingvaj biciklistoj kaj piedmigrantoj kun *Olivier Buisson*
- 2022-okt-18/23 → Ĥora (korusa) renkonto de *Interkant* kun *Zdravka Bojĉeva*
- 2022-okt-21/23 → post-Somera Universitato de EDE
- 2022-okt-24 / nov-03 → AŬTUNE, la Esperanto-ferioj, kursoj kun *Anna Löwenstein (sur la foto), Murat Özdizdar*



# Argentina kongreso

La 62-a Argentina Kongreso okazos en la 7-a ĝis 10-a de oktobro en la ĉefurbo, en la sidejo de la Landa Asociuo. Ni alkroĉas la duan bultenon.

Ni uzas la eblon de la jubilea kvarcenta komuniko por esprimi grandegan dankon al la kontrolistoj de lingva korekteco kaj eĉ enhavaj demandoj. La nunaj kontrolantoj estas Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi kaj Elda Doefler. El la pasinto elstaras la plurjara laboro de Mirejo Grosjean.

========= vortoj: 650 =========

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis majo **2022** (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.